

Esperanto-Informilo

64-a jaro

por Berlin kaj Brandenburgio

(661) 08-09/2014

Meritplena berlina esperantistino 70jariĝis



Ina Tautorat dum solena fermo de la 84a UK 1999 en Berlino post transdono de la kongresa flago al la israela LKK-ano Eran Vodevoz (ĉe mikrofono) apud Kep Enderby, prezidanto de UEA (dekstre)

Ĉijare la 17an de marto Ina Tautorat preskaŭ nerimarkite pro ŝia modesteco sepdekjariĝis. Multaj en Berlino, sed ne nur ĉi tie, konscias pri ŝia eksterordinara kontribuo al la Berlina Esperanto-vivo.

La hodiaŭ en Esperanto-domo Lichtenberg funkcia Ĵaŭda Rondo estis fondita de ŝi kaj ŝia edzo Hermann jam en 1978 en ilia loĝejo en Falkstraße 25, Neukölln kaj siatempe fariĝis mondwide konata.

Kiom da eksterlandaj geesperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo ŝi gastigis? Verŝajne tio ne estas nombrebila kvankam ekzistas gastlibroj! Kiu ŝatas pli scii pri la gastama atmosfero legu la kontribuojn de Ina kaj ŝia filino Vera Tautorat pri Ĵaŭda Rondo en la Jubilea Libro de ELB el 2006.

Jam en ŝia loĝejo en Apostelstraße 6 ekde 1974 funkciis Esperanto-butiko kiel renkontiĝejo de berlinaj geesperantistoj.

Baldaŭ en Falkstraße 25 ekestis la Esperanto-Centro de Berlino kaj hejmo por la berlinaj Esperanto-biblioteko kaj arkivo - la legenda Espoteko.


Kune kun la edzo ŝi savis trezorojn por la berlina Esperanto-arkivo. Multo jam delonge estus perdita sen ilia engaĝo.

Dektri jarojn de 1977 ĝis 1990 Ina Tautorat gvidis la Esperanto-Ligon Berlino kiel prezidantino.

24jaraĝa ŝi en 1968 lernis Esperanton. Du jarojn antaŭe ŝi edziniĝis al Hermann Tautorat. Profesie ŝi de 1970 ĝis 2008 laboris kiel muzea pedagogino en Juniomuseum (Muzea parto por infanoj) de Etnologia Muzeo en Berlin-Dahlem, ekde 1996 ŝi estris ĝin. Vidu la broŝuron: Ina Tautorat, 38 Jahre JuniorMuseum im Ethnologischen Museum Berlin: (ehemals: Museum für Völkerkunde), 2008

En la tempo de ŝia prezidanteco ELB sukcese evoluis kaj modernigis. La kvanto de membroj altiĝis de 57 en 1977 al 110 en 1988. Ion pri la malfacileco de ŝia komenco kaj pri ŝia personeco esprimas ŝia unua alvoko kiel ELB-prezidantino.

«Kiel vi legis en pasintmonata "Berlina Informilo", oni elektis min prezidantino de nia Ligo. Bedaŭrinde mi devas konstati, ke multajn el vi mi ne konas kaj multaj nur malofte vizitas niajn kunvenojn. Sed mi volas kunlabori kun vi ĉiuj! Do mi ege petas vin: Venu al niaj renkontiĝoj. Eĉ se malnovaj kvereloj kaj poste la kutimo ĝis nun malhelpis vin: Venu! Montru vian interesiĝon je nia komuna afero. Malnovaj disputoj estu forgesitaj. Ni ĉiuj, ĉu junaj ĉu maljunaj, devas kunlabori por finfine atingi niajn sukcesojn. Kun bonaj deziroj por 1977 salutas vin Ina Tautorat.» el: Berlina Informilo, marto 1977



Hermann kaj Ina Tautorat en la Esperanto-kunvenejo en Falkstr. 25 (ĉ. 1990)

Ŝi gvidis trankvile la kunfandiĝon de la esperantistoj en okcidenta kaj orienta partoj de Berlino en kontakto kun la estraro de la orientberlina distrikta organizaĵo en GDREA.

En 1993 Ina pro siaj meritoj fariĝis Honora Membro de ELB. Por ŝi tio ne estis signalo ripozi.

Elstaran oficon ŝi akceptis en 1996. Ina fariĝis sekretario de LKK por la 84a Universala Kongreso de Esperanto 1999 en Berlino, post kiam ŝia edzo Hermann,

sekretario en la Provizora LKK, subite mortis.

Ina decide kontribuis al la sukceso de la unua UK en Berlino, la ĝis nun plej granda Esperanto-evento en nia urbo.

Ĉar en la loĝejo de la familio Tautorat ĝis 2005 troviĝis la Berlina Esperanto-centro ni vizitantoj de la Ĵaŭda Rondo kunsentis la tragikajn kaj ĝojigajn travivaĵojn de la familio de Ina. Ni ankoraŭ tie spertis la ĝojon de Ina paroli kun ŝia nepino Lara en Esperanto.

Nun Ina ne plu staras tiel centre en la berlina Esperanto-movado, tamen ŝi aktive partoprenas, kaj ni povas ĝoji havi tian spertan kaj saĝe kunagantan esperantistinon en Berlino.

Fritz Wollenberg

Averto

Ne estas bone, ke en paŭta laco
Ni ĉiuj sidas en mallaŭta paco,
Ĝis elĉiele eĉ la nizo krias:
Samideanoj, nun la krizo nias!

Sed ĉu, anstataŭ milde-mole piki,
Ni nun komencu akre polemiki?
Ja ĉia kverelado, peze-moke
Impresas, ni konfesu, mezepoke.

Kaj ne adoru nure vian PIVON,
Se vi alstrebas lingve pian vivon,
Sed gvidu vin La FUNDAMENTO sola,
Ne kun rigido, sed kun sento mola!

Gerd Bussing

Rückblick auf die Jahreshauptversammlung 2013

Am 05. April 2014 fand im Kulturzentrum *danziger50* in Berlin die Jahreshauptversammlung des Esperanto-Verband Berlin-Brandenburg sowie der Esperanto-Liga Berlin statt. Anwesend waren 13 Vereinsmitglieder, davon der größte Teil Mitglieder mit Wohnsitz in Berlin.

Nach den ersten, dem Vereinsrecht geschuldeten Förmlichkeiten wurde ein Rückblick auf die vielfachen Aktivitäten des Vereins im vergangenen Jahr in Berlin sowie Brandenburg gegeben. Auch an dieser Stelle noch mal ein herzlichen Dank an alle engagierten Vereinsmitglieder.

Auf Kritik stieß die unregelmäßige Erscheinungsweise des Infomilo, das im Jahr 2013 nur zweimal erschienen ist. Die Kritik wurde von Vorstandsmitglied Marc Hanisch angenommen und ein verlässlicheres Erscheinen zugesagt.

Zwei weitere wichtige Themen waren die erfolgreiche Eintragung der Satzungsänderungen unseres Vereins beim Amtsgericht Charlottenburg sowie die erfolgreiche Auszahlung des Erbes unseres im Jahre 1999 verstorbenen Mitglieds Karl Maier.

Das Erbe war auch ein Gegenstand des anschließend durch Vorstandsmitglied und Kassierer Christoph Hoppe vorgelegten Kassenberichtes 2013. Generell hielten sich Ausgaben und Einnahmen im vergangenen Jahr im Rahmen. Allerdings muss nun entschieden werden, welche Verwendung das Erbe Karl Maiers findet. Der Vorsitzende Felix Zesch mahnte an, dass das Geld zweckgebunden ausgegeben werden müsse und nicht auf dem Vereinskonto geparkt werden dürfe. Daraufhin wurden von einigen Mitgliedern bereits die ersten Vorschläge zur Verwendung des Geldes

eingereicht (siehe auch der folgende Aufruf).

Danach erfolgten die Berichte über die Aktivitäten der zahlreichen Esperanto-Gruppen: den Anfang machten die Berliner Esperantisten Fritz Wollenberg für die Esperanto-Gruppe im Kulturzentrum *danziger50*, Hans Moser, der seit 35 Jahren die Esperanto-Gruppe Lietzensee leitet, und Johan Pachter, Organisator der *Ĵaŭda Rondo* im Esperantohaus Lichtenberg. Felix Zesch berichtete über den Treff *Plenbuŝe*, der, wie es der Name nahe legt, regelmäßig in einem Restaurant stattfindet sowie über die *Luda Rondo* im Eiskaffee Kibo. Edeltraut Henning aus Prenzlau berichtete über die zahlreichen Aktivitäten in Prenzlau und Neubrandenburg, während Ronald Schindler das Jahr 2013 in Frankfurt an der Oder Revue passieren ließ. Vereinzelt Einzelkämpfer gibt es ebenso in Finsterwalde, Jüterbog, Schwedt, Falkensee, Brandenburg an der Havel sowie Potsdam.

Schließlich konnte der Vorstand in einer offenen Abstimmung für den Zeitraum des Jahres 2013 mit einer Enthaltung entlastet werden. Im Anschluss wurde ein Ausblick auf die Planungen für das laufende Jahr gegeben: auch dieses Jahr gibt es wieder zahlreiche Projekte und Termine, für die noch tatkräftige Helfer gesucht werden, so z.B. das diesjährige Sommerfest im September, die Arbeit Fritz Wollenbergs am Jubiläumsbuch «111 Jahre Esperanto in Berlin und Brandenburg», das Vegan-vegetarische Sommerfest Ende August auf dem Berliner Alexanderplatz, auf welchem das erste Mal die Esperanto-Liga Berlin vertreten sein wird, die *Expolingua 2014*, die noch fleißige Standhelfer sucht, sowie das *Zamenhof-Fest* im Dezember. Details sowie weitere Termine sind bitte dem Kalender bzw. unserer Internetseite zu entnehmen.

Marc Hanisch

Kein Esperanto-Park in Berlin

Auf den im Januar 2014 an mehrere Fraktionen der BVV herangetragenen Antrag, einer Grünfläche nahe des Max-Josef-Metzger-Platzes im Berliner Wedding den Namen «Esperanto-Park» zu verleihen, kam vom zuständigen Ausschuss die Antwort, dass der Vorschlag ausführlich in der AG Geschichte (eine AG des Ausschusses für Bildung, Kultur und Umwelt der BVV Mitte) diskutiert wurde und auch das Straßen- und Grünflächenamt dazu befragt wurde. Das Ergebnis ist negativ:

«Auf der Grundlage der vorliegenden Auskunft des Straßen- und Grünflächenamtes Mitte, wonach es im Bezirk Neukölln bereits einen Esperanto-Platz gibt, stellt die AG fest, dass die beantragte Benennung gem. der AV-Benennung, Ziff. 1, (3) a) – Ausschluss erneuter Verwendung vorhandener Namen – nicht möglich ist.»

Der erwähnte Artikel der Ausführungsvorschriften zu § 5 des Berliner Straßengesetzes vom 29. November 2005 lautet: *«Ein in Berlin bereits vorhandener Straßename darf nicht erneut verwandt werden. Sich nur in den Grundwörtern (Straße, Platz, Weg, Allee, Damm oder dergleichen) voneinander unterscheidende sowie gleich und ähnlich lautende Straßenbezeichnungen gelten als Wiederholung.»*

Aufgrund dieses formalen Kriteriums wurde unser Antrag leider abgelehnt. Ein anderer, sinnvoll begründbarer Name für den gleichen Ort böte aber die Chance für einen neuen Anlauf. Schade, dass wir die aktuelle Rechtslage nicht kannten und so uns und anderen vergebliche Arbeit verursacht haben.

Felix Zesch

Vegan-Vegetarisches Sommerfest 2014 mit Esperanto

Der Antrag auf einen Stand beim [Vegan-Vegetarisches Sommerfest 2014](#), das vom 29.-31.8.2014 auf dem Alexanderplatz stattfindet, hatte nach einigem Hin und Her Erfolg. Die Vereinbarung mit den Veranstaltern sieht vor, dass am Stand nur Vegetarier und Veganer informieren.



Mit Unterstützung des Fachverbands [Tutmonda Esperantista Vegetarana Organizo](#) (TEVA) wird nun an einem Konzept gearbeitet, mit dem am Stand über die Berührungspunkte von Esperanto und Vegetarismus sowie Veganismus informiert werden kann. Alle Vegetarier und Veganer mit Interesse an Esperanto sind herzlich eingeladen, bei Vorbereitung und Durchführung des Standes mitzuwirken.

Felix Zesch

Maja naskiĝis

La Berlin-Brandenburgia Esperanto-komunumo bonvenigas novan membron – ne nur de la familio de la ELB-prezidanto Felix kaj lia edzino Ursula, kiujn ĝi elkore gratulas, sed ankaŭ de la Germana Esperanto-Asocio kaj ties subasocio en Berlin. Naskiĝis la knabino Maja la 3an de junio 2014. Same kiel al ŝia pli aĝa fratino Frida, la patro parolas al Maja ĉefe Esperanton.

Serverumzug

Durch den Umzug von esperanto.de auf einen neuen Server kam es leider in den vergangenen Wochen zu Unannehmlichkeiten bei Benutzung unserer Internetseiten. Diese sollten mittlerweile behoben sein.

esperanto.berlin

Unsere Internetseiten sind dafür jetzt auch über die Adresse esperanto.berlin erreichbar. Der D.E.B.-Vorsitzende Sebastian Kirf konnte sich diese Domain für uns sichern.

Ponta festo en Frankfurt (Odro) en Germanio kaj Słubice en Pollando

La partopreno de esperantistoj en la «Ponta Festo» je la 1-a de majo en Frankfurto jam havas plurjaran tradicion. Tiun oficialan eventon organizadas maldekstra partio kaj sindikatoj de la urbo Frankfurto okaze de majfesto. Nur ĉifoje la kunligita Esperanto-aranĝo okazis dum tri tagoj.

Jam merkrede la unua gasto el Hungario venis kaj tranoktis ĉe mi pro la longa alvojaĝo.



Je la 1-a de majo 2014 frumatene ni komune aranĝis la ekspozicion pri kaj por Esperanto en informstano. Al la ekspozicio ĉefe apartenis libroj, ĵurnaloj, kompaktdiskoj, faldfolioj kaj aliaj interesaĵoj. Precipe preterpasintaj infanoj profitis de verdaj aerbalonoj, sur kiuj estis

skribita www.esperanto.de varbcele. Aldoniĝis de ni faldfolio kiel instrukcio, en kiu informiĝas pri Esperanto superrigarde. Apud la libroj de la bedaŭrinde tro frue forpasinta Lena Karpunina, la freŝeldonita libro «La Zamenhofstrato» en germana lingvo kompletigis la ekspozicion.

Haltis ĉe la informstano multaj interesitaj homoj, kiuj ne nur venis el Frankfurto. Kulmino estis intervjuo de la regiona televida stacio. Parto eĉ videblis dum la tiutagaj televidaj novaĵoj.



Dum tiu ĉi tago alvenis pluraj partoprenantoj de la Esperanto-aranĝo, okazis malgranda promenado tra la urbocentro de Frankfurto kun japanaj, hungara kaj polaj gastoj, kiuj i.a. ne povis partopreni la promenadon dum la sekva tago. Ĉar temis pri publika festo, ĉiu partoprenanto ankaŭ de la Esperanto-aranĝo povis ĝui tiun etoson, vizitante aliajn stanojn aŭ gustumi frandaĵojn, kiujn oni ofertis. Ankaŭ eblis aŭskulti muzikon kaj spekti diversajn gimnastikaĵojn. Kelkaj uzis la eblecon viziti la urbon Słubice kaj ĉinan restoracion, kiun ni frekventis dum la pasintaj jaroj.

Vespere ni kunvenis en la kafejo Słubfurt, kie kutime preskaŭ ĉiuĵaŭde okazadas Esperanto-kurso. Komenciĝis la regula programo. La ĉefo de la kafejo, kiu samtempe estas mia lernanto de Esperanto, invitis ĉiujn al «dolĉa vespermanĝo». T.e. kuko, sed ne kutima, sed vegana. Estis nova sperto de preskaŭ ĉiuj ĉeestintoj. Sed la dolĉaĵoj estis bongustaj kaj ĉiuj laŭdis la bakinton.

Sekva programero estis koncerto de Lena Wilke el Schwedt kiu prezentis malnovajn kaj tute freŝajn kantojn, kiujn ŝi parte tradukis el la ukraina lingvo kaj parte verkis origine. La daŭra aplaŭdo signalis, ke la koncerto plaĉis. Multan dankon al ŝi pro la granda kultura plezuro.

Entute sep esperantistoj poste tranoktis en studenta gastejo en Słubice. La «malmola kerno» antaŭ enlitiĝo vizitis la konatan ĉinan restoracion por gustumi bonan polan bieron kaj esploris eblecon por la komunaj matenmanĝoj.

Vendrede post bongusta matenmanĝo en la proksimeco de la gastejo okazis la granda promenado tra la urbo «Słubfurt», kiu estas arta urboprojekto kunigante kaj Frankfurton kaj la najbaran polan urbon Słubice, kiujn nur dividas la rivero Odro. Ĉiĉeronis dum tiuj kvin horoj Michael Kurzwelly, prezidanto de la asocio Słubfurt r.a. Li, ankaŭ kiel iniciinto, memkompreneble plej bone povis klarigi la ekeston, la kunligojn, la nunan situacion kaj la sekvontajn paŝojn por pluen evoluigi tiun rimarkindan projekton, kiu servu al la enloĝantoj kaj al la gastoj de ambaŭ urboj. Vizitindis la centro de Słubfurt kaj parto de la «urbomuro».

Dum la promenado ne nur daŭre pluvis sed ankaŭ regis sufiĉe malvarma vetero, ke ĉiuj baldaŭ frostis. Ni sukcesis revarmiĝi en la kafejo Słubfurt, kiu bonŝance troviĝis rande de la itinero. Tie ĉiu partoprenanto ricevis donace grandan kaj interesan libron pri «Nowa Amerika», kiu estas pli granda regiona projekto laŭ ambaŭ bordoj de la riveroj Odro kaj Niso, inkludante ankaŭ Słubfurton. La libron ni ricevis antaŭ la oficiala disdonado, do ni kvazaŭ estis la unuaj, kiuj povis teni ĝin en la manoj.

Sekvis la demokratia decido pri la daŭrigo de la promenado malgraŭ la veteraĉo. Eĉ la pola samideano Zibi el Szczecin (Pollando), kiu havas malfacilaĵojn rilate al

marŝado, deziris daŭrigi. Tra pluvo kaj frosto ni preterpasis la plej altan domon en Frankfurto kaj stiris niajn paŝojn al la «Ponta placo» (Brückenplatz), kiu estiĝis post la malkonstruo de diversaj loĝdomoj apud la strato, kiu rekte kondukas al la najbara urbo. Sur tiu placo civitanoj de ambaŭ urboj, kiuj formis «parlamenton», aranĝis areon de diversaj instalaĵoj kiel biciklan itinereon, parolangulon kaj globludejon. El la vidpunkto de la partoprenantoj de la promenado menciindis instalaĵo sur tiu placo, kiu rilatis al Esperanto. Temo de tiu projekto estas la prezentado de la historio de la limaj konstruaĵoj kaj instalaĵoj, kiuj troviĝis sur la najbara urba ponto. Tiun projekton mi mem organizis. La tekstoj al diversaj fotoj kaj bildoj sur kvar informkolonoj ne nur legeblis en germana, pola kaj angla lingvoj sed ankaŭ en Esperanto. Tiun aferon ni bedaŭrinde ne sukcesis ĝui kiel planite pro la vetero. Ni rapide iris al la ponto, kie estis tiuj limaj instalaĵoj, kiuj funkciis por la dogano kaj limpolico inter 1952 kaj 2007. La domoj kaj la aldonaĵoj post la aliĝo de Pollando al Eŭropa Unio en la jaro 2004 kaj la aliĝo al la konvencio de Schengen ne plu necesis kaj pro tio oni malkonstruis ilin de 2012 ĝis 2013. En la jaro 2009 parto de la domoj fariĝis la urbodomo de Słubfurt dum kelkaj tagoj.

La sekva stacio estis la Collegium Polonicum sur la pola bordo de Odro. Tie i.a. troviĝas la kulturoteko pri Nowa Amerika, en kiu oni kolektas ĉiujn aĵojn, kiuj rilatas al la samnoma projekto. Antaŭ la vizito de tiu ni rajtis iri sur la tegmenton de la universitata konstruaĵo kaj havis bonan rigardon al Odro kaj Frankfurto. Ĉi tie ankaŭ estis farita grupa foto.

En la kulturoteko ni informiĝis pri multaj aliaj detaloj de Nowa Amerika kaj Słubfurt. Dum la diskutado ni forĝis la tempon kaj tro malfrue ekiris al la planita tagmanĝo en komforta restoracio de Słubice. Bonŝance ni tamen ricevis kaj

niajn sidlokojn kaj bongustajn manĝaĵojn. En la restoracio ni restis dum pluraj horoj kaj devis adiaŭi plurajn partoprenantojn, kiuj nur venis pro la urbopromenado.

La restintoj vespere vizitis koncerton en germana lingvo en Frankfurt kaj finis la tagon en trinkejo proksime al la ponto.

Post sabata matenmanĝo ni denove renkontiĝis por foriri al la tiutaga ĉefa programero. Temis pri interesa diskutrondo en la Collegium Polonicum al kiu pro ni alvojaĝis d-ro Detlev Blanke de Berlino. Li parolis pri la relativaj sukcesoj de Esperanto tutmonde. Origine estis invititaj la enloĝantoj de Frankfurto kaj Słubice, sed pro la longa semajnfino inter la 1-a kaj 4-a de majo verŝajne multaj forestis. Pro tio la aranĝo fariĝis bona bazo por argumentado kaj varbado por Esperanto.

Lasta programero fariĝis komuna tagmanĝo en surstrata restoracio, ĉar tiutage brilis la suno, kvazaŭ tio devis esti kutimaĵo. Supozeble ĝi deziris nur ripozi dum la antaŭa tago. Ĉi tie i.a. informiĝis pri problemoj de la Esperanto-biblioteko en Berlino, kiu troviĝas en la Esperanto-domo kaj en la korta domo en la urbokvartalo Lichtenberg.

Tuj post la adiaŭo de la lastaj partoprenintoj mi moviĝis al esperantistino Ludmilla Hypius, kiu havis la 103-an datrevenon de sia naskiĝtago je la 2-a de majo. Estis kortuŝa momento ne nur por la jubileinto.

Kvankam la nombro de la partoprenintoj ne atingis la deziritan nombron, ĉiuj estis kontentaj kaj ne venis gravaj plendoj. Entute tamen ĉeestis 24 esperantistoj el kvin landoj, kiuj partoprenis minimume unu aŭ du programeron. La oferton de tranoktado nur uzis sep gesamideanoj. Kaj la tranoktejo valoris.

Ronald Schindler

Frühlingstreffen der Esperantisten in Prenzlau

Das Frühlingstreffen der Esperantisten in Prenzlau hat schon Tradition. Ein Höhepunkt war natürlich die Landesgartenschau im vergangenen Jahr. 30 Gäste aus Szczecin, Koszalin, Neubrandenburg, Berlin, Frankfurt/O, Neustrelitz und Japan bewunderten sie.

Wie wird das Echo in diesem Jahr sein, nach der Landesgartenschau? Meiner Einladung folgten 17 Esperantisten aus Szczecin, Pila, Sztum, Berlin, Frankfurt/O, Neustrelitz. Sie waren neugierig, was von der Pracht des Vorjahres noch zu sehen ist.



Am 17. Mai trafen wir uns im Restaurant «Schützenhaus», wo wir immer bestens versorgt und bedient werden. Danke dem Personal! Beim traditionellen Frühstück führte Edeltraut Henning durch das Tagesprogramm und las Epigramme eines polnischen Autors. Ronald Schindler berichtete anhand von Lichtbildern über das Brückenfest in Frankfurt/O anlässlich des 1. Mai. Werner Pfennig, Vorsitzender des Esperanto Bundes Mecklenburg-Vorpommern, informierte über die Partei EDE (Europa-Demokratie-Esperanto). Irena Tomaszewska aus Szczecin überbrachte herzliche Grüße der polnischen Esperantisten und überreichte Edeltraut Henning ein Diplom für langjährige Zusammenarbeit mit den Esperantisten in Szczecin.

Nach dem gemeinsamen Mittagessen begannen wir unseren Spaziergang durch den Seepark. Die Bewunderungen über

das gut erhaltene LAGA-Gelände nahmen kein Ende. Mit Stolz konnte ich meinen Themengarten zeigen, den ich mit 2 Kolleginnen in persönliche Pflege genommen habe.

Auf dem Rückweg wurde die Marienkirche bestaunt und der neu gestaltete Marktberg bewundert. Die restaurierte Stadtmauer fand reges Interesse. Ein großes Lob erhielten die mehrsprachigen Info-tafeln.

Bevor wir zum Kaffeeklatsch ins «Schützenhaus» zurückkehrten, erinnerten wir uns an den Beginn unseres Esperanto-Klubs vor fast 20 Jahren mit Edeltraud Zettler als Lehrerin.

Mit unvergeßlichen Eindrücken über das sich positiv veränderte Prenzlau fuhren die Gäste nach Hause.

Edeltraud Henning, aus dem Nordkurier

Aufruf

Wir suchen Ideen, wie das Erbe unseres verstorbenen Mitglieds Karl Maier sinnvoll und dem Verein nutzend investiert werden könnte.

Vorschläge oder die Unterstützung bereits eingereichter Ideen können direkt an den Vorstand (berlin@esperanto.de) gesendet werden. Im Anschluss soll ein Stimmungsbild für alle eingereichten Ideen ermittelt werden. Folgende Vorschläge wurden während der JHV 2014 diskutiert:

- Bildung einer Stiftung (Dr. Phillip Sonntag)
- Finanzierung der Reise und Teilnahmegebühren von 2 bis 3 afrikanischen TEJO-Mitgliedern zum IJK 2015 in Wiesbaden (Elisabeth Schwarzer)
- Erwerb neuer Bücher für die Esperanto-Bibliothek Berlin (Gerd Bussing)
- Investition in eigenen Vereinsraum (Felix Zesch)

Juna daŭrigenda tradicio en Berlino: ĉiumonata ludado en kafejo Kibo

Jam dum pli ol 6 monatoj okazas ĉiumonata esperantlingva renkontiĝo por ludemuloj en Berlino. Ĝi okazas unufoje dum ĉiu monato, kutime en ĝia mezo, kaj ĝis nun ĉiam okazis sabate ĉe Eiskafe Kibo en Wedding, kaj verŝajne daŭros tiel. Kutime venas inter 5 kaj 15 homoj, kaj berlinanoj kaj gastoj, kaj eĉ unufoje venis hundo.

La ludoj kiujn ni ludas tre varias. Foje ni ludas rapidajn, simplajn ludojn, kaj foje multhorajn, pli komplikajn. Dependas je kiu venas, kiuj ludoj estas kunportataj, kaj la emo de la ĉeestantoj. La renkontiĝo okazas preskaŭ tute en Esperanto, sed kompreneble komencantoj ankaŭ bonvenas. Ni ja ludas lingvajn kaj vortludojn, ekzemple Skrablon kaj Tabuon, sed ne nur. Pli ofte ni ludas kart-kaj tabulludojn, kiuj ne estas en Esperanto, sed ludeblas en ajna lingvo. Ĉiam iu klarigas la ludon en Esperanto kaj, se necesas, tradukas.

Oni ne devas pagi ian kotizon, sed indas mendi trinkaĵon aŭ manĝaĵon de la kafejo, ĉar ni uzas ĝian spacon. La bongustaj manĝaĵoj inkluzivas glaciaĵon kaj aliajn desertojn, sandviĉojn kaj matenmanĝecajn pladojn, kaj pli. Mendeblas vegetaraj, veganaj, viandaj, kaj malmultkostaj elektoj, eĉ per esperantlingva menuo.

Se vi ankaŭ ludemas, mi esperas vidi vin baldaŭ en nia rondo! Venontaj ludadoj okazos je la 12a de julio kaj je la 16a de aŭgusto, ĉiam inter la 14a kaj la 21a, dum kiu homoj venas kaj foriras laŭplaĉe. Pliaj informoj aperas regule ĉe esperanto.berlin.

Jessica Grasso

**Esperanto-Ligo Berlin invitas al
Somera festo sur la Esperantoplaco en Berlin-Neukölln
la 3an de septembro 2014 ekde 15a horo**



Esperantoplaco atingeblas de
S-trajn-stacidomo Sonnenallee rekte trans
Siegfried-Aufhäuser-placo tra Schwarzastrato.

Kunagu por publike prezenti la funkciantan Esperanton kaj ĝian kulturon! Ni atentigu pri nia jubileo «111 jaroj Esperanto en Berlino kaj Brandenburgio» kaj pri problemoj sur kaj ĉirkaŭ la placo!

El la programo:

12a h Preparaj laboroj sur la placo

15a h Festkomenciĝo per arta evento de Munkena artistino Adler A.F.

Paroladetoj sub la Zamenhofkverko • Muzikaj kaj teatraj elpaŝoj

Ekspozicio: 111 jaroj Esperanto en Berlino kaj Brandenburgio enhavanta ekzemple rarajn ilustritajn raportojn pri la vivo en Berlino dum la Unua Mondmilito el manskribita Esperanto-gazeto el la jaroj 1917-1919 kaj fotojn kun klarigoj pri la kultura programo de la Komuna Esperanto-Kongreso Dana- Germana-Pola en 2012 en Berlin-Lichtenberg • La artisto Christoph Böhm ekspozicias kaj klarigas modelon de la arta projekto «Mond-Urbo de Birdoj» por arta plivalorigo de la Esperantoplaco • ludoj por infanoj sur la apuda infanludejo, por kiu ni serĉas nomon en rilato al Esperanto aŭ ĝia kulturo akcepteblan por infanoj • Komuna plantado por plibeligi la placon • orgenkoncerto en preĝejo Sankta Rikardo • informoj pri asocioj kaj projektoj ĉirkaŭ la Esperantoplaco • kunluda teatro de diversnaciaj gejunuloj en Esperanto-ĝardeno de interkultura teatra centro • restoracio ĉe la placo ofertas ekstere ĉe tabloj trinkaĵojn kaj manĝaĵetojn

19a h Esperantistoj kaj la kunorganizantoj nepublike daŭrigas la feston en la ĉambroj kaj en la Esperantoĝardeno de la interkultura teatra centro ĉe Esperantoplaco

ELB organizas la feston kune kun «**A-Z Hilfen Berlin**», **Kvartala Manaĝado Richardplatz Sudo**, **Paroĥa komunumo Sankta Rikardo**, **infanvartejo kaj hejmo por maljunuloj de Sankta Rikardo**, «**Galerio bauchhund**», Stadtagenten (urbaj agentoj) **Benedikt & Lorenz**, unuiĝo **Roma Trial**, interkultura teatra centro, **Löwenzahn (leontodo)-lernejo**, **Infanpavilono ĉe Drorystrato**, projekto «**Ze-Bus**» kaj loĝantoj. Subtenantoj: **Eŭropa Unio**, **Eŭropa Fonduso por Regiona Evoluigo**. **Investo por via estonto**, **Distrikta Oficejo Berlino-Neukölln**, **Senata Administracio por Urba Evoluo kaj Medio**, **Federacia Ministerio por Medio**, **Naturprotektado**, **Konstruado kaj Reaktora Sekureco**, **EFRE - ŝanco por Eŭropo**, **Sociale Urbo**, **Subteno por urba konstruado de federacio**, **landoj kaj komunumoj**.

Estraro de Esperanto-Ligo Berlin

Kontaktoj:

Germana Esperanto-Asocio

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, infozentrum[ĉe]esperanto.de
konto: 860 3600 ĉe Sozialbank Mainz (banka kodo: 550 205 00)

**Ekde 2011 ĉiuj brandenburgiaj kaj berlinaj esperantistoj direktu
demandojn rilate al sia membreco rekte al la supra adreso!**

Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj Esperanto-Liga Berlin e. V:

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin,
eabb[ĉe]esperanto.de

konto: 70550102 ĉe Postbank Berlin (banka kodo: 10010010)

Prezidanto: Felix Zesch, tel.: 030 81809112

Vicprezidanto: Ronald Schindler, tel.: 033605 524138

Berlina Esperanto-Junularo:

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin
ej.berlin[ĉe]esperanto.de
tel.: 030 428 578 99

EsperantoLand e.V. :

Lu Wunsch-Rolshoven, tel.: 030 685 5831, esperantoland[ĉe]esperantoland.de,
www.EsperantoLand.de

Esperanto? Plenbuŝe! - praktikada tablorondo:

Philippe Beaudonnet, tel.: 030 217 562 33, philippe.beaudonnet[ĉe]gmx.net

Ĵaŭda Rondo:

renkontiĝejo: Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, tel. 030 428 578 99

Grupo Lietzensee:

Hans Moser, tel.: 030 8621411

Esperanto-Kalendaro por aŭgusto kaj septembro 2014

Ĉiun ĵaŭdon je la 20a horo **Ĵaŭda Rondo**, Berlin, Einbecker Straße 36

Ĉiun ĵaŭdon 19a 15-20a 45: **Porkomencata kurso** – Café Stubfurt, Lindenstraße 6, 15320 Frankfurt. Ronald Schindler, tel.: (033605) 52 41 38, RonaldSchindler@web.de

Aŭgusto 2014

8-a, vendredo	19a 30 - 22a 00	EsperantoLand , renkontiĝo en kafejo «Arema», Birkenstraße 30, 10551 Berlin (metrostacio Birkenstr.)
12-a, lundo	19a 30- 21a 30	Danziger 50. – Was geschah in Buenos Aires, Argentinien? Rückblick auf den 99. Esperanto-Weltkongress mit dem Thema: «Werden uns die Enkel segnen? Streben nach dauerhafter Zukunft» --- Kio okazis en Bonaero, Argentino? Rerigardo al la 99a Universala Kongreso de Esperanto kun la temo «Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco».
16-a, sabato	14a 00 - 21a 30	Aŭgusta Kibo-ludado en Eiscafé Kibo, Transvaalstraße 13, 13351 Berlin, U6 Seestraße aŭ Rehberge
25-a, lundo	19a 30- 21a 30	Danziger 50. – Unsere Reisen, Gäste, Begegnungen – Besucher werden gebeten, eigene Erlebnisse mit Esperantofreunden aus dem In- und Ausland zu erzählen --- Niaj vojaĝoj, gastoj, renkontiĝoj – vizitantoj estas petataj rakonti pri propraj ĉijaraj travivaĵoj kun Esperantogeamikoj en- kaj eksterlande
27-a, merkredo	18a	Schnupperkurs Esperanto – Einführungsveranstaltung zur internationalen Sprache Esperanto als Auftakt für einen Anfängerkurs im Hauser Dramatische Republik, Schudomastraße 32 am Esperantoplatz

Septembro 2014

3-a, merkredo	12a 00 – 19a 00	Somera festo– Esperantoplatz, Neukölln – (vd. inviton p. 9)
9-a, mardo	14a 15 - 16a 00	Grupo Lietensee – Nachbarschaftshaus am Lietensee e.V., Herbartstraße 25, 14057 Berlin. Jeder erzählt über «seinen» Sommer
12-a, vendredo	19a 30 - 22a 00	EsperantoLand , renkontiĝo en kafejo «Arema», Birkenstraße 30, 10551 Berlin (metrostacio Birkenstr.)
24-a, merkredo	14a 15 - 16a 00	Grupo Lietensee. – Trautenastr. 6, 10717 Berlin. Interessantes aus Esperanto-Zeitschriften
26-a, vendredo	20a	Esperanto? Plenbuŝe! – praktikada tablorondo
26-a-28a		Poznań (Pollando) – ARKONES (ARTaj KONfrontoj en ESperanto)

Presindikoj**Eldonas:** Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio**Kompilis kaj enpaĝigis:** Philippe Beaudonnet (eibb[ĉe]esperanto.de)**Reta versio:** <http://esperanto.berlin/>, **reta dezajno:** Chuck Smith**Esperanto-Infomilo Berlin-Brandenburgio estas la oficiala organo de Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj de Esperanto-Ligo Berlin**